Augustin Wibbelt,

Aŭtuno

tradukita de Manfred Retzlaff

Alie estis iam,
Sonadis birdo-kant',
Kaj ardis alte tiam
Heĝ-rozoj ĉe la vojo-rand'.

Alie estis iam.
La arko ds l' ĉiel'
Sin volbis silke, kiam
Or-brilis kampoj en la hel'.

La rozoj forvelkintas,
Nur dornoj nudas jen;
Sur kava kamp' restintas
Por birdoj nur la lasta gren'.

Trnkvile ĉe l' kameno
Jarfine sidas mi.
Pri la greneja pleno
Mi ĝojas. - Danku ni al Di'![2]

Traduko de la Basgermana poemo "Hiärfst" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984-12.29.*

MR-170-1 / Arg-682-1373 (2012-11-26 19:30:50)

[2] aŭ:
Mi ege ĝojas - Dank' al Di'!